Sir Harold Boulton,

# La Skaja boatkanto

*tradukita de Agnes B. Deans*

Iru, boat', kiel bird' en flugad'
El nia sabla kaj',
Portu la princon mem en irad'
Sur la ondar' al Skaj.

Bruas tondrad', blovas venteg',
Saltas la ondegar',
Haltas sen tim' pro la muĝeg'
Nia malamikar'.

Ĉe la boat' muĝas la mar',
Ocean' estas reĝa lit'.
Lia lulil' estos l' ondar'
Kaj Florin' gardos lin.[4]

Granda homar, plena de fort'
En la batalmaten',
Antaŭ maten', jam en la mort'
Kuŝis sur Kuloden'.[5]

. . .

Sir Harold Boulton,

# The Skye Boat Song

Speed, bonnie boat, like a bird on the wing
Onward, the sailors cry!
Carry the lad that's born to be King
Over the sea to Skye.

Loud the winds cry, loud the waves roar,
Thunderclaps rend the air.
Baffled our foes stand by the shore.
Follow they will not dare.

............................................
............................................
............................................
............................................

Many's the lad fought on that day
Well the claymore could wield,
When the night came silently lay
Dead on Culloden's field.

. . .

[4]Florin' = Flora,
la heroino Flora MacDonald.

[5]= Culloden, la loko, kie la Jakobanoj estis venkitaj en 1745.

Ne staras plu nia hejmar'
Kaj dispeliĝis ĝi.
Tamen al ni, sia anar',
Karlo revenos li.[6]

*Traduko de la Angla poemo "The Skye Boat Song" de* Sir Harold Boulton *(∗1859 – †1935-06-01) en Esperanton de Agnes B. Deans.*

*Arg-1027-2083 (2014-05-28 12:09:05)*

*Tiu ĉi kanto-traduko troveblas en* `http://eo.wikisource.org/wiki/La_Skaja_Boatkanto`*. Pri la origina kanto-versio vidu la retejon* `http://www.educationscotland.gov.uk/scotlandssongs`*.*

Burned are our homes, exile and death
Scatter the loyal men.
Yet ere the sword cool in the sheath
Scotland will rise again!

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas* Sir Harold Boulton *(∗1859 – †1935-06-01).*

*Arg-1027-2082 (2015-01-21 17:49:48)*

*Pri la kanto vidu la retejon* `http://www.educationscotland.gov.ukscotlandssongs/primary/genericcontent_tcm4555681.asp`*, pri la verkinto al retejon* `http://en.wikipedia.org/wiki/Sir_Harold_Boulton,_2nd_Baronet`*.*

[6] Karlo = Princo Charles Edward Stuart